



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 8
1971

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
37-a (42-a) jaro
Monata

PRO MERITO

Portantoj de la ordeno. Listo ĝisdatigita je la 31a de Majo 1971.

Granda Kruco:

†Ole Brochmann Sletterød	Oslo	1958
†Ragnvald Rian	Trondheim	1964
Rolf Bugge-Paulsen	Oslo	1971

Komandoroj de la 1-a klaso:

Carl Støp-Bowitz	Oslo	1956
†Aagot Sletterød	Oslo	1965
Johan Hammond Rosbach	Sarpsborg	1969

Komandoroj de la 2-a klaso:

Arnfinn Jensson	Oslo	1951
Olav Rygg	Oslo	1952
Olav Thormodsen	Haugesund	1965
Elna Matland	Sauda	1967
Halvdan Karterud	Trondheim	1969

Kavaliroj de la 1-a klaso:

Liv Jensson	Oslo	1951
Johan Matland	Sauda	1951
†Magnus Tveit	Trondheim	1951
Mason Stuttard	Cliviger, Anglujo	1952
Erling Anker Haugen	Trondheim	1955
Hans Amund Rosbach	Kristiansund	1958
Alfred Skyberg	Oslo	1961
Ludvig Anjer	Oslo	1961
†Bjørn Ottesen	Oslo	1967
Tharald Dybing	Oslo	1967
Lars Kåre Hunnes	Trondheim	1971

Kavaliroj de la 2-a klaso:

†Søren Engesgaard Christie	Oslo	1951
Rolf Holm	Tromsø	1951
Trygve Müller	Jørpeland	1951
Osvald T. Nicolaisen	—	1951
Anna Chris. Nilssen	Bodø	1951
Erling Peder Næss	Trondheim	1951
Ernst Westrheim	Oslo	1951
Signe Korstvedt	Oslo	1951
Sverre Brantsæter	Oslo	1951
†Carl Haave	Brumunddal	1951
Else Bugge-Paulsen	Oslo	1952
Oluf Olsen	Oslo	1952
†Hartvig Andersen	Barkåker	1952
†Georg Emil Rokkan	Narvik	1953
Madeleine F. L. Haudebine	Paris, Francujo	1953
†John A. Nilsen	Bergen	1954
Arne Høgseth	Tromsø	1954
†Gustav Skogstrøm	Drammen	1954
Henry Torbjørn Fridén	Halden	1955
Karsten Frenning Langsholt	Sarpsborg	1955
Arne Johan Halvorsen	Fredrikstad	1955
Enevald Mårli	Bodø	1956
Anders Strai	Mandal	1957
†Johan A. Kleven	Hamar	1957
†Didrik Mjølhus	Sandve	1957
†Birger Nordstrand	Trondheim	1957
Leonora Sivertsen	Bergen	1958
Kjell Lie Offerdal	Bergen	1958
†Trygve Raimar	Mestervik	1959
†Gustav Johannessen	Hamar	1959
Harda Danielsen	Oslo	1961
Brynhild Østmo	Oslo	1961
Astrid Mansrud	Oslo	1961
†Betzy Nielsen Sveen	Trondheim	1961
Trygve Kvalvåg	Stavanger	1963
†Johannes Jahren	Bergen	1963
Nanna Fridrichsen	Oslo	1963
Lif Berg	Trondheim	1965
Nils Utne	Trondheim	1965

(Daŭr. p. 101)

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B,
N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por
manuskriptoj: la 20. en la monato
antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj ekster-
lando: n. kr. 12,—.

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 40,—,
1/8 p. kr. 20,—.

Malfruiĝoj kaj malfruemoj

De tempo al tempo nia gazeto malfruiĝas. La kaŭzo ĝenerale estas troa laborpremo en la presejo, do teknikaj aferoj, pri kiuj ne povas decidi la redaktoro.

Jam pli ol unu monaton antaŭ la apero, la redaktoro devas fari skizon pri la ĉefa enhavo. La 20-an en la monato antaŭ la apera monato ĉiu materialo devas esti kolektitaj. Tiam restas nur ĉ. unu semajno por la fina redaktado kaj la enpaĝigo de la diversaj kontribuajtoj.

Kontribuajtoj alfluadas: raportoj, artikoloj, poemoj, recenzoj ktp. Kelkfoje klubaj raportoj pri la novjarfestoj venas en majo — kaj do plej frue povos aperi en septembro, kiam ĝi efektive estas iomete neaktuala.

Pli grave estas, ke oni grand-skale ne respondas al petoj kaj sinturnoj de la redakcio. Por ĉi tiu

numero eliris sep leteroj kun peto pri kontribuado. El la sep ricevintoj du sendis la petitan materialon. Kvin entute ne reagis, kvankam ili estis petitaj almenaŭ poŝtkarte indiki jeson aŭ neon al nia peto. Eble ĉiuj kvin estis survojaĝe. Dume tagon post tagon ni atendis — nun pasis du semajnoj post la limdato. Tio signifas: unue: la gazeto aperas, (nekalkulita la eventuala teknika malhelpo en la presado) ĉ. du semajnoj post la decidita elirtago, due: aliaj personoj devis urĝe fari la petitan laboron — aŭ atendi ĝis la posta numero, se ankaŭ ili malfruemas. Povas esti, ke en novembro ni havos duoblaĵojn de pluraj artikoloj.

Ĉi tiuj vortoj estu skribitaj nur por indiki, ke la malhelpoj ne ĉiam estas teknikaj — ofte estas, kiel ĉe la aeroplanaj katastrofoj, homa difekto.

*

LA KONTORFONDAĴO

Pli frue	kr. 773,00
L. Madsen	» 5,00
C. S. B.	» 10,00
H. Danielsen	» 20,00

kr. 808,00

Sinceran dankon al ĉiuj donacintoj!

*

Sciigoj de N.E.L.

Kotizoj por 1972. Por eviti interrompon en la liverado de Norvega Esperantisto estas grave ke ĉiuj membroj pagas sian kotizon frue. Klubanoj bonvolu pagi al la kluba kasisto, rektaj membroj al N.E.L., prefere jam antaŭ Kristnasko.

Anoncoj en Norvega Esperantisto. Nia malgranda revuo estas la senkompare plej granda konto en nia budĝeto. Kelkaj anoncoj certe estus valora helpo. Ni tial petas niajn membrojn varbi anoncojn por nia gazeto. Vidu la anoncprezojn sur la 3a paĝo de ĉiu numero.

U.E.A.-kotizoj 1972. Por eviti interrompon en la ricevado de la Jarlibro kaj de la gazeto «Esperanto» ĉiuj Individuaj Membroj de U.E.A. devas nun laŭeble baldaŭ pagi sian kotizon por 1972. Pagu al la loka Delegito aŭ rekte al la Ĉefdelegito por Norvegujo, s.ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6, poŝtgirokonto 133.29. Ni rekomendas al ĉiuj membroj aboni la Jarlibron kaj la gazeton de U.E.A. La kotizoj por 1972 estas neŝanĝitaj: Membro-Jarlibro kr. 30,00, Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton «Esperanto») kr. 60,00, Membro-Subtenanto (ricevas la Jarlibron kaj la gazeton) kr. 90,00.

57a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Portland, Oregon, Usono, somere 1972. Aliĝiloj estas riceveblaj de Turisma Servo de N.E.L., Boks 942, Oslo 1. Ĉiuj interesiĝantoj estas petataj anonci sin al la Turisma Servo laŭeble baldaŭ por ke ĝi povu plani vojaĝarandon.

La Oficeja Fondaĵo. La Liga Estraro kore dankas al ĉiuj bonkoraj donacintoj por tiu grava fondaĵo. Sed ni daŭre bezonas pliajn donacojn por teni la oficejon. Ĉiuj donacoj estas bonvenaj, ĉu ili estas grandaj, ĉu malgrandaj.

Taskotabelo por la kluboj. — *Novembro:* La estraro sendas registritan informon al ĉiuj membroj, kiuj ne eksigis laŭ la statuto, sed de kiuj tamen revenis la poŝta enkasigilo sen pago, ke oni nun forstrekos ilin kiel klubanojn. La estraro admonas la klubanojn pagi la kotizojn por la venonta jaro. La Delegito de U.E.A. kolektas la U.E.A.-kotizojn por la venonta jaro kaj verbas novajn Individuajn Membrojn de U.E.A. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

Raporto de la Liga Estraro pri la 3a jarkevarono. Okazis unu estrarkunveno kaj oni elsendis unu cirkuleron. John Berggreen reprezentis la Ligon ĉe la U.K. en Londono. Ĉar U.E.A. ne plu volas inviti la registarojn, nur la lokajn ambasadorejojn, ĉeestis la Inaŭguron reprezentanto de la Norvega Ambasadorejo en Londono, sed ne salutis. Oni planas ofset-eldonon de la gazeta kurso, kaj diskutis metodojn de monkokolektado, la utiligon de kongresaj rezolucioj, kaj la sorton de nia gazeto.

La Liga Estraro.

Jubileoj

La 6-an de novembro La Urso, Sarpsborg, estos 20-jara.

La 28-an de novembro Klubo Esperantista en Oslo estos 55-jara.

dankinda. Speciale menciinda estas ŝia partopreno en la laboro pri Plena Ilustrita Vortaro, kies tre klarajn desegnojn ŝi faris. Ŝi desegnis ankaŭ la ordenon Pro Merito.

Ni kore gratulas pro la jubileo!

JHR

EVA STØP BOWITZ 60-JARA

La 27-an de oktobro s-ino Eva Støp-Bowitz estos 60-jara. Jam kiel fraŭlino Eva Sandberg ŝi estis tre aktiva membro en la Klubo Esperantista en Oslo, i.a. sekretarino. Ŝi daŭre aktive partoprenas la kluban vivon, kaj la klubo en Oslo multon ŝuldas al ŝi pro sukcesplenaj aranĝoj. Inter alie ŝi estas la ĉiam helpema kudristino de esperantistoj en- kaj eksterlandaj, kaj ankaŭ — tradicie — de la tuta osla klubo ĉiusomere ŝi estas aparte

Nekrologo

RUTH OLSEN FORPISIS

La 17an de Julio forpasis s-ino Ruth Olsen en Tromsø, la edzino ni la liga konsilantarano de N.E.L., Herolv Olsen. Spite al grava malsano dum la lasta tempo ŝi fervore lernadis Esperanton per la germana kurso de Hermann Behrmann, sed la sorto ne permesis al ŝi finstudi in. Al ŝia edzo ni esprimas sinceran kondolencon.

C. Støp-Bowitz.

Daŭr. de p. 98.

PRO MERITO....

Eva Støp-Bowitz	Oslo	1965
Kjell Gustavsen	Oslo	1965
Karl Ekhaugen	Oslo	1965
Sigvald S. Ege	Haugesund	1965
Sigmund Blikshavn	Haugesund	1967
Ole Johan Rønnevig	Haugesund	1967
Erling Vorland	Haugesund	1967
John Berggreen	Oslo	1969
Norman Birkeli	Sauda	1969
Per Johan Krogstie	Løten	1969
Kirsten Ek	Oslo	1971
Aslaug Karterud	Trondheim	1971
Aslaug Krogmo Næss	Trondheim	1971
Oddmund Rykkvin	Trondheim	1971
Ingolf Blikstad	Trondheim	1971

Vojagu al Libano, lando kun 6000-jara historio!

Karaj geomikoj,

Mi neniam forgesos vin ĉiujn kiuj kunlaboris dum mia prelegvojaĝo en la komenco de 1970. Mi petas pardonon ke mi tute ne havas tempon skribi unuopojn. De aprilo 1970 mi akiris fakan laboron ĉe biblioteko de Oslo. Mi bonege fartas ĉi tie inter bonaj esperantistoj.

Nun mi revenu al la rakonto el la lasta vojaĝo al Oriento (13.—27. majo). Mi ĉeestis grupvojaĝon de Tjæreborg, dana vojaĝoficejo. La vojaĝo kostas nur kr. 1000 por po unu semajna restado en Istanbul kaj Beiruto. La aranĝo inkluzivas hotelojn kaj manĝojn. Dum la restado oni estas tute libera. Se vi ne prenos la hotelan neindan internacian manĝon, vi povas vojaĝi ankaŭ al aliaj urboj. De Istanbul, Bursa kaj Ankara, de Beiruto al Biblos, la plej malnova urbo de la mondo kaj eĉ al Damaskus, ĉefurbo de Sirio per 4 horoj, de tie Amman, ĉefurbo de Jordano, estas atingebla per 5 horoj.

Kompreneble la muzeoj kaj moskeoj estas tre interesaj. Ankaŭ grandaj bazaroj havas multajn aĉetindaĵojn. Manĝaĵoj: ŝafviandaĵoj, legomaĵoj, kukoj, fruktoj kaj nuksoj estas abundaj. Trinkaĵoj: suko de sukerkano, palmo, karoto, ĉerizo, mango kaj pomo estas fremdaj. Klimato estas agrabela

kun ĉiama sunbrilo. Homoj estas tre afablaj kaj amikaj.

Ĉefe mi devas esprimi koran inviton de libanaj esperantistoj (Libana Esperanto-Asocio ĉe Salah Ghanem: Azarich A-1, 4a esaĝo No II Emir Bechirst., Beiruto). En Istanbul oni povas kontakti delegiton de UEA.

Fine mi ankaŭ deziras rekomendi vojaĝon al Tunizio, kie mi estis dum la pasko. Tjæreborg aranĝas malmultekontan vojaĝon. Mi flugis al Monastir kaj povis ĉirkaŭvojaĝi la tutan landon, ankaŭ Sahara Dezerton. Tie vi renkontos ĉarmajn geesperantistojn, kiuj certe bonvenigos vin.

Ne forgesu ŝlosilojn kaj propagandilojn!

Tamiko Kaŭakami.

*

ĈU VI MEMORAS?

Ĉu vi memoras, ke la redaktoro havas stokon da poŝtmarkoj vendotaj? Ĉu vi scias, ke vi povas ricevi pakaĵojn da tre belaj bildpoŝtmarkoj por po 5, 10, 15, 25, 50 kaj 100 kronoj? Ĉu vi scias, ke vi povas elekti temon, ekzemple poŝtmarkojn kun birdoj, bestoj, floroj aŭ pentraĵoj? Aŭ ekzemple svedajn, francajn, arabajn, hungarajn, polajn, finnajn?

Ni daŭre demandas nin kun ega miro, kial precipe svedaj legantoj aĉetas tiajn pakaĵojn. Kial ne vi, norvegoj?

*

La refleksiva pronomo en Esperanto

La komuniko de la Akademio pri la uzo de la refleksivaj pronomoj ŝajnas ne multe devii de la klarigoj en P.V. La reguloj plejparte sekvas la leĝojn de la logiko kaj konformas al la uzo en la norvega lingvo. Tamen mi volas doni kelkajn rimarkigojn.

Al regulo I (1—3) devas esti aldonite:

«Nur se post la gramatika subjekto venas *infinitivo* au participo kunligita al *substantivo* transformebla en *logikan subjekton*, oni povas uzi regulon I. Do se inter la reflektivo kaj la gramatika subjekto venas *substantivo* uzebla kiel *logika subjekto*, la reflektivo rilatas al la lasta.

Mi citos kelkajn ekzemplojn:

Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli, *ol mem.* (devas esti: *ol sin mem*). Ŝi ribelis kontraŭ la interveno *de edzo* en ŝiajn aferojn (devas esti: *de sia edzo*). Sed: Ŝi protestis kontraŭ la interveno en siajn aferojn (ĉar ĉi tie ne intervenas nova logika subjekto).

(2). Ŝi ekvidis viron staranta antaŭ ŝi. La kontrasta ekz.: «Ŝi ekvidis starantan viron antaŭ si» ne estas bone elektita.

Li portis seĝeton refalditan sur si mem (nekomprenebla frazo).

Li rekompencis la soldatojn batalintajn por *sia* savo (nelogike) Devus esti: por *lia* savo.

(2) devas esti (3). Ŝi zorge observis la enportadon de siaj kofroj. Ĉi tie ne estas persona objekto kunligita al la verbalsubstantivo «enportado». «*Siaj kofroj*» do devas reiri al «*ŝi*». — La afero estas alia se intervenas persono (subst. aŭ pronomo) servanta kiel log. subj. «Ŝi observis la portistojn portantaj ŝiajn kofrojn» (siajn kofrojn = tiuj de la portistoj. Marta admiris *lian* fidon al si (do al li). Marta admiris *lian* fidon al ŝi.

Ŝi *kompleze* aŭdis la flatadon de *ŝiaj* amindumantoj (ĉu ne: de *siaj* amindumantoj?). Laŭ regulo I (1): Ŝi plaĉe aŭdis siajn svatantojn flati *ŝin*.

La situacio povus esti jena (laŭ Odiseo):

«Penelopeja kompleze aŭdis la flatadon de *siaj* amindumantoj, dum la *sklavinoj* ĉiun tagon aŭdis la flatadon de *ŝiaj* svatantoj.»

H. Fridén.

*

DONACE

Donace ni ricevis valorajn pakaĵojn da poŝtmarkoj de Tharald Dybing kaj de Klubo Esperantista en Oslo. Same Elzbieta Lewicka, Lodz, Polujo. Koran dankon! La pm. estas jam monigitaj. Kelkaj legantoj sendis saketojn da uzitaj pm, ankaŭ ili ricevu nian dankon. Ĉiu guto valoras, Do, daŭrigu la kolektadon; tiel vi fortigikas nian ekonomion.

*

Du poemoj de Kjell Walraamoen:

FLOROJ APUD L'ABISMO

Dum frua somermateno
 ŝi iris sur roso,
 intencis kolekti florojn
 por la dimanĉotablo —
 Nudajn maleolojn ŝi havis
 kiujn roslarmoj kisis —
 Ŝi glitis sur la nuda roko
 kaj falis du cent futojn
 en ŝtonkrutaĵon —

Li ne partoprenis
 kiam la najbaruloj venigis ŝin
 hejmen —
 li kaŝis sin
 malantaŭ la provizdommuro
 kaj ombriĝis
 kiam ili domen ŝin portis
 sub blanka tolaĵo —

Ĉiu somermateno
 iradas maljuna juna viro
 rosvojeton ĝis la roko
 kriante ŝian nomon
 en tagleviĝon
 kaj estas preparata —
 Baldaŭ ankaŭ li
 sub blanka tolaĵo
 estu portota hejmen —

*

LETERO AL MIA AMATO

Amata —
 kiam La Kreinto rigardas cin
 li interplektas manojn siajn
 kaj estas tute kontenta
 kun sia majstraĵo. —

*

ATENTU KONGRESANOJ!

3 norvegaj kongresanoj — 2 s-inoj k
 1 s-ro — estas petataj turni sin al la
 subskribanto, — kiu renkontis ilin ekster
 «Royal Festival Hall», — tiuj post la
 inaŭguro la 1an de aŭgusto, — k kaptis
 tie bildon, kio bone sukcesis. —

Unu s-ino estis nacie vestita —
 «BUNAD», — se ŝi deziras bildon skribu
 al *Th Smådabl*, Hagegt. 36, Oslo 6.

PÅ NORSK

UNIVERSALA ESPERANTO- ASOCIO

er også iår foreslått som kandidat
 til Nobels fredspris. Blant forslags-
 stillerne er en gruppe svenske riks-
 dagsfolk, ialt 132, fra alle partier.
 Dessuten er Esperanto-organisa-
 sjonen foreslått av 14 danske fol-
 ketingsrepresentanter, og av grup-
 per av parlamentsfolk fra en rekke
 land, også av medlemmer av det
 Norske Storting.

Forslagsstillerne legger alle vekt
 på den store utbredelse Esperanto
 allerede har og på hvor viktig det
 er med ett felles språk som en
 forutsetning for en fredelig utvik-
 ling i verden.

SPRÅKPROBLEMER I EUROPARÅDET?

Også innenfor Europarådet har
 man språkproblemer. I desember
 vedtok man således at man skal
 nytte også tysk og italiensk som
 arbeidsspråk ved siden av de alle-
 rede offisielle språkene engelsk og
 fransk. Europarådet skal selv bære

kostnadene ved alle oversettelsene
 som følger av dette. Det ville være
 både praktisk og økonomisk å inn-
 føre et felles språk, som Esperanto.

ALBRECHT DÜRER-PLAKAT MED ESPERANTOTEKST

Byen Nürnberg, som i år feirer
 maleren Dürers 500-års jubileum,
 har i anledningen gitt ut en vak-
 ker kunstplakat, som har fått stor
 anerkjennelse hos skjønnere. En
 del av opplaget er forsynt med
 følgende tekst på det internasjonale
 språket Esperanto: «Esperanto —
 ponto al naciaj kulturoj. Nürn-
 berg invitas vin — Dürer-jaro
 1971.» (Esperanto — en bro til de
 nasjonale kulturer. Nürnberg in-
 viterer deg — Dürer-året 1971.)

INTERNASJONAL UNGDOM OPPTATT AV ESPERANTO

TEJO (Tutmonda Esperantista
 Junulara Organizo) heter ungdom-
 mens internasjonale Esperanto-
 organisasjon. Den hadde sin kong-
 ress i Edinburg 8.—14. aug. i år.
 Temaet for kongressen er «Ung-
 dom og kultur.»

Siden på sommeren, 5.—12. sep-
 tember, hadde den stadig aktive or-
 ganisasjonen et seminar i Strass-
 bourg med hovedemne «Språk og
 kultur». Til dette seminaret ble
 også innbudt medlemmer av andre
 internasjonale organisasjoner og
 fagfolk som interesserer seg for
 dette emnet.

*

Ses poemoj de Lina Gabrielli:

Mi ne estas poeto

Mi ne estas poeto,
 mi estas nur ino,
 Tamen mi provas
 kanti pri nia amo,
 kanti al ci,
 al ĉielo
 brilanta
 de suno, de bluo,
 al firmamento
 sur ŝutita
 de steloj
 kun luno.

Sajnas la vivo eterna

Sajnas la vivo
 eterna,
 ŝajnas mi
 nova ino.
 Ho mi volas droni
 je brakoj ciaj!

Mi volas pensi al nenio

Mi volas pensi
 al nenio,
 nur al hodiaŭa
 tago.
 Mi volas pensi
 al nenio,
 nur al ci,
 mia amata!

Mi dronas

Mi dronigas
 mian buŝon
 en ciaj haroj!
 Kiel dolĉe,
 kise ĉifi
 la harojn
 ciajn!

Kisoj dolĉaj, ciaj

Kisoj dolĉaj,
ciaj,
donas al mi
la vivon.
Mi ne plu
memoras
pri suferado mia!

Karuleto mia

Mia dolĉa, mia amata,
karuleto mia!
via lumo, kia rido
elfluas el estaĵo cia,
kiam per kisoj
ci duŝas min
en akvo
varma de emocio.

La aŭtoro, D-ino Lina Gabrielli,
verkis ĉi tiujn poemojn en
Norvegujo pasintsomere.

*

«Bonvenon al Gotenburgo»

Ĉar la urbo Gotenburgo dum la tuta jaro 1971 festas sian 350-jaran jubileon, la Inter-Agadgrupo por Esperanto invitis al internacia semajno de amikeco. Dum mia restado tie mi havis agrablan semajnon kune kun diverslandaj esperantistoj.

La akceptservo funkciis bone. La aliĝintojn akceptis gesinjoroj en la enirhalo de Hotelo O.K., kaj tuj ni ricevis niajn dokumentojn kaj la ŝlosilojn al niaj ĉambroj.

Je la sesa s-ro Lennart Åberg bonvensalutis la ĉeestantojn al

interkona vespero. Ĉeestis du usonanoj, unu ĉeĥo, tri finnoj — unu el ili Vilho Setälä — du norvegoj (Kjell Offerdal kaj mi); la ceteraj estis svedoj.

La programo: Dimanĉe: Matena horeto de poezio de Iva Åberg. Vizito en la amuzejo Liseberg kaj tagmanĝo samloke. Lunde: La aktuala situacio de la internaciaj lingvaj problemoj ĝenerale, de Lennart Åberg. Poste diskuto. Vespere: «Prago eterna», kulturhistoria prelego de Iva Åberg. Marde: Vilho Setälä pri la kalevala kulturo, aspektoj de la finna popolpoezio. Aŭtobusa rondveturo tra la urbo, kaj tagmanĝo en Slotsskogen. Merkrede: La aktuala situacio de la Esperantomovado kaj ĝia pozicio en la debato pri internaciaj lingvaj problemoj, Lennart Åberg. Poste diskuto. Posttagmeze boatveturo sur la urbaj kanaloj, sub 19 pontoj kaj tra la haveno. Belega vetero. Vespere de la gastoj: Lumbildoj el Bergen kaj el Usono. Ĵaŭde: Kompara lingvostudado de Vilho Setälä. Referaĵo pri aktuala universitata laboro komisie de Finna Scienca Akademio. Demanda horo. Posttagmeze: Vizito en Kultura Centro de Gotenburgo, Götaplatsen, Urba Teatro, Koncerta Halo, Arta Muzeo, Urba Biblioteko. Tagmanĝo en centra urba parko. Ĝisrevida vespero.

Vendrede matene ni vagonare iris hejmen por flugi al Londono.

Th. Resberg.

*

RecenzojPRI NI MEM KAJ
PRI NIA TERO

Leander Tell: Estiĝo de la tero kaj de la homo. Popularscienca eseo. Antaŭparolo de D-ro C. Støp-Bowitz. Eld.: STAFETO: Beletraj Kajeraj 38., J. Régulo. La Laguna, Tenerifo, 1971. 124 paĝoj. Broŝurita. Prezo: 2 usonaj dolaroj.

Leander Tell estas jam konata nomo inter la esperantistoj. Ni ja memoras lian interesan libron «La bela subtera mondo». Kiel la titolo de tiu libro supozigas, Tell estas speleologo. Dum sia esplorado de la subteraj grotoj li renkontis problemojn koncerne geologion, biologion kaj arĥeologion — ĝuste la problemojn, kiuj interesas — aŭ devus interesi — la homojn pli ol io alia. Oni povas per malmultaj vortoj koncize nomi la temon de ĉi tiuj problemoj: «Estiĝo de la tero kaj de la homo». Leander Tell nomis sian libron ĝuste tiel.

La titoloj de la ĉapitroj pli bone ol io donas la ĝustan impreson pri la enhavo: La materiigo, Geologia historio de la terglobo, Pri la kvaternaria epoko kaj la glaciegaj periodoj, La tero sub niaj piedoj, La evolucio de la kulturo de l'homaro, La murpentraĵoj de la Ŝtona Aĝo, La homiĝado.

Kiel la aŭtoro diras mem, la intenco de la libro estas popularigi

la du esencajn homajn interesojn. La libro ne estas pura scienca traktaĵo.

Leander Tell vere sukcesis. Kiel esperantisto jam de 1908 li bone regas la Internacian Lingvon, li scias popularigi en la plej bona signifo de tiu vorto. Estas vera plezuro sekvi lian lertan gvidadon, ĉar, kiel diras D-ro Støp-Bowitz en la enkonduko: el ĉiu frazo radias lia viva enamigo al sia temo kaj li scias intereskapte rakonti pri ĝi.

Mi aldonu, ke 16 el la paĝoj de la libro — kunigitaj en la mezo — estas bildaj paĝoj el escepte bona papero.

Ĉiu maldormema esperantisto ĝuos la libron.

Johan Hammond Rosbach.

*

ONI RIDIS

En unu el niaj kluboj oni ridis. Jen la klubanoj kolektis poŝtmarkojn kaj poste sendis ilin al la redaktoro. Kaj vidu: la poŝtmarkoj revenis en saketoj — kiuj kostas po 2 kronoj! Nu, tio estas sufiĉa kaŭzo por rido.


Sed — tiuj saketoj enhavas ne nur poŝtmarkojn. Kelkaj enhavas informon pri premio, do simple astataŭas loteriajn biletojn. Tial ni ripetatas: mendu saketojn. Vendu ilin en la klubkunvenoj, kaj faru interesan kaj ridigan programon el la vendado!

*


FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO – NEFA

Kaldbakkstubben 22, Oslo 9
Redaktoro: Odd Kolbrek,



La plej rapida trajno en la mondo kaj senkompara ekipaĵo
laŭ la linio Tokyo – Osaka



*La japanoj streĉigas sin por plibonigi sian transportreton. I.a ili
insistas havi la plej rapidvetuvantan trajnon de la mondo.*

Pli ol 200 milionoj da pasaĝeroj veturigas ĝis nun la Hikari-ekspreso, ĝi estas la plej rapidveturanta trajno kaj trafikadas la linion Tokyo—Osaka. New Tokaido Line, kiun la linio nomigas, oficiale inaŭgurigis por trafiko en oktobro 1964, tute antaŭ la Tokyo-olympiado. La

inaŭguro okazis akurate 92 jarojn post la reformema imperiestro Meiji inaŭgurigis la unuan fervojon en Japanio, la 29 km. longa linio inter Tokyo kaj Jokohama kiu trapasiĝis dum iom pli ol unu horo.

Dum la jaroj post 1945 establiĝis iom

post iom fabrikoj kaj aliaj entreprenoj en la marborddistriktoj inter Tokyo nord-oriente kaj Osaka sudoriente. Pli ol 40% de la japana popolo loĝas ĉi tie kaj en ĉi tiu distrikto okazas pli ol 70% de la totala industriproduktado. Sed antaŭ la Tokaydo-ekspreso ektrafikadis, nur 3% de la japana fervojreto trafikadis ĉi tiun parton de la lando, la plej grava parto laŭ ekonomia signifo. Pro ĉi tiu kaŭzo oni faris ĉion eblan por konstrui ĉi tiun ekspreson kaj speciale intencante pri la pasaĝertrafiko.

La konstruado de la linio daŭris de 1959 ĝis 1964. Por la unua fojo en la japana fervojhistorio oni aplikis normalŝpuron; 1,435 m. Ĉiu relo estas 1500 m. longa por atingi la plej grandan vibradmoderigon. Intencante pri la granda rapideco, 225 km. po hore, oni provis konstrui la linion tiel rekte kiel eble. Sed ĉar en la borddistrikto estas multe da montoj kaj do multe da deklivoj, oni devis laŭ 68 km. longa distanco konstrui 67 tunelojn kaj 1300 pontojn.

La trajno konsistas el 12 vagonoj. La koloroj estas blua kaj blanka kaj estas 987 sidlokoj. Oni devas havi sidlobiletan por trairi la kontrolbaron sur la kajo en Tokyo centralstacio. En la trajno oni 5 ope unu apud la alia sidas en komfortaj, bluaj seĝoj. La ekipaĵo en la trajno estas fantaziega, en ĉiu vagono ope estas unu konduktoro kiu kontrolas la malgrandajn, beletajn servistinojn kiuj prizorgas ke la pasaĝeroj ricevas tion kion ili deziras. Antaŭ ĉiu seĝo estas kunfaldebla tablo kaj en la trajno estas ankaŭ 2 restoracivagonoj. Post kiam oni sidigis sin kaj la trajno komencis veturi kaj post proksimume 10 minutoj, informigis en la laŭparolilo ke estas teleŝonejo 2 loke en la trajno. Kiam la kon-

duktoro venas en la vagonon, li ĝentile staras, klinas sin kaj diras ke li multe ĝojas ĉar la pasaĝeroj elektis ĝuste lian vagonon kaj poste lin kontrolas la biletojn.

(Daŭrigota)

*

Norvega Kroniko

*Raporto pri merkredo la 23a de
junio, Sankta Johano-vespero.*

La kamparanoj ĉirkau Tyrifjorden havas de tempo al tempo la strangan sperton rimarki ke granda aro de strange parolantaj kaj kontantaj homoj kolektiĝas sur la strando ĉe Hagalund, precipe en la Sankta Johano-noktoj.

Kio okazas? Ĉu ne estas la nokto kiam sorĉistinoj flugas sur balailoj por kolektiĝi sur Bloksberg? Ne, estas ja nur la Klubo Esperantista en Oslo kiu vizitas s.inon Else Bugge-Paulsen kiu jam plurfoje afable kaj gastame invitas nin celebri la mezsomeran nokton en sia somerhejmo. Kaj ĉiam ni danke kaj ĝoje akceptas spertinte kiel bonege oni povas amuzi sin kaj bonfarti inter la esperantistoj en tia naturbela kaj interesa loko.

Ĉi-tiun fojon entute 41 gesami-deanoj kolektiĝis, inter ili 7 gastoj kaj 10 infanoj. La vetero estis pli favora al ni ol pasintan jaron. Ni povis pli longe resti eksterdome banante, remante aŭ promene-tante. Bobby aranĝis spritaĵajn skeĉetojn kaj dancludojn.

Ĉe la brulstiparo ni povis sidi longe kantante je la gitara akom-

pano de s.ro Grotmål. Ni ĝuis la alvenantajn krepuskon kaj plenlunon ĝis la plej malluma tempo kiam s.ro Støp-Bowitz eksendadis siajn belkolorajn raketojn en la aeron super la lagon je ĉies admiro.

Kaj endome ni povis fortigi nin per varma kafo kaj bonegaj buterpanoj kaj kukoj preparitaj en la diversaj hejmoj kaj metitaj sur la tablojn de la ĉiam prizorgema kaj fervora «kafinaro».

Tro rapide pasis la tempo kune, kaj kun bedaŭro sed ankoraŭ gajhumoraj, ni devis ekveturi hejmen post dankadiaŭoj al la gastigantino.

Jam ni revas pri venontaj Sankta Johano-noktoj ĉe Else!

Raportis *Annalise Rees*.

*

Esperanto — renkonto sur la Haukeli-monto.

La 25 an kaj la 26 an de Septembro, kolektiĝis gesamideanoj, proks. 30 entute, de la kluboj en Bergen, Odda, Haugesund, Sauda kaj Kristiansand en Haukeliseter Fjellstue.

La iniciantoj de ĉi tiu aranĝo estis ges.roj Elna kaj Johan Matland, Sauda. Ili opiniis tre grave ke la esperantistoj kolektiĝu de tempo al tempo por ĝui la kunestadon kaj interŝanĝi ideojn, doni unu al la alia impulsojn.

Multaj samideanoj reagis je la invito, kaj la aranĝo tre sukcesis.

Sabate vespere oni post tre bon-gusta manĝaĵo rigardis filmon kaj lumbildojn de la kongreso en Lon-

dono. Oni dancis, kantis, s.ro Matland faris magiajn artojn, kaj la plej maljuna partoprenanto, s.ino Karen Berge el Sauda, deklamis.

Dimanĉe oni aŭskultis al spertoj pri la kongreso, partoprenintoj en Londono estis intervjuataj.

La gvidantino de la gazetara servo de N.E.L. s.ino Elna Matland, informis pri sia laboro tiurilate, kaj instruis al la ĉeestantoj kiel ili plej efike kaj per modestaj rimedoj povas fari gazetan propagandon por Esperanto.

Post la kunveno oni faris ekskurson en la montaron en la bela aŭtuna vetero, por ĝui la monton kaj la brilajn kolorojn.

Haukeliseter Fjellstue estis la konvena, belega kadro ĉirkaŭ la aranĝo, kaj la kontentaj partoprenantoj esprimis la deziron ke ĉi tion oni ripetu. Ĉiuj sentis ke la amika etoso kaj la agrabla kunestado donis valorajn memorojn.

Elna Matland.

Oslo

4/5 71. Ni komencis per komuna kantado de la Kluba Marŝo, laŭ akompano de Clive Rees per piano kaj Randolph Grotmål per gitaro.

Kiel «Vortoj por pripensoj» — enkonduke al sia prelego pri la Feroaj Insuloj, R. Grotmål legis «Hilsen til Færøylene» (Saluton al la Feroaj Insuloj) el «Blant frender på Færøylene» (Inter parencoj en la Feroaj Insuloj) de Niels Brantzæg.

En la prelego R. Grotmål rakontis pri la lando, kiu apartenas al

Danujo, sed havas sian propran registaron. La oficiala lingvo estas la dana, sed buŝe oni uzas la naciaan feroan lingvon. La viroj fiŝkaptas, la virinoj trikas kaj la infanoj estas en la lernejo. Popoldancoj estas konservitaj kaj tre popularaj. Grotmål montris multajn belajn lumbildojn, precipe el la feroaj insuloj, sed ankaŭ kelkajn el Budor kaj Aremark. La prelego rikoltis grandan kaj merititan aplaŭdon.

Unu el la pioniroj de la Esperantomovado en Norvegujo Bjørn Ottesen, mortis la 22-an de aprilo, kaj C. Støp-Bowitz diris memorigajn vortojn tiuokaze.

24/5 71. La prez, Annalise Rees deziris koran bonvenon al la lasta klubkunveno antaŭ la somerferioj. Kiel «Vortoj por pripensoj» ŝi legis la poemon «Al ĉiuj plaĉi neniu povas» de Ivar Aasen.

Ĉefprogramo: «La Angulo de la Parolantoj» laŭ modelo de «Speakers Corner» en Hyde Park en Londono. John Berggreen elektiĝis kiel diskutgvidanto.

Stefan Murak prezentis ideon pri Esperanto en la infanĝardenoj, Thor Magnus Carlsen enkondukis la diskutadon pri informado kaj varbado, kaj John Berggreen faris la demandon «Kiel konservi la novajn Esperantistojn?»

Multaj el la ĉeestantoj partoprenis la diskutadon, kiu estis tre vigla.

Dum la kafopaŭzo Odd Kolbrek rakontis iomete pri la Internacia Fervoĵista Esp. Kongreso

en Maribor, Jugoslavujo, 15.—21. majo.

8/6 71. Je la 16.30 horo la ŝipo forlasis la Kajon B en Pipervika en bela suna vetero por veturi al Oxval, Nesodden, kie okazis nia unua kutima somerkunveno en formo de ekskurso.

Laŭ akompano de C. Støp-Bowitz per tirharmoniko kaj R. Grotmål per gitaro ni komencis per komuna kantado.

La prez. Annalise Rees dankis al gesinjoroj Støp-Bowitz ĉar ili ankaŭ ĉi tiun jaron bonvole invitis la klubon al agrabla kunesto en kampara etoso.

C. Støp-Bowitz, prez. de la Ekzamena Komisiono, disdonis diplomojn al jenaj, kiuj plenumis ekzamenojn:

Otto Prytz, superan,
Julie Romsdal, elementan.

C. Støp-Bowitz admonis la membrojn studi por ekzamenoj, precipe tiujn kiuj ankoraŭ ne faris, sed ankaŭ al la aliaj li rekomendis prepari sin por la pli altaj gradoj — la supera kaj instruista ekzamenoj.

John Berggreen legis saluton de la prez. de UEA, prof. Ivo Lapenna okaze de la 60-jara jubileo de NEL. Li ankaŭ legis la 2 rezoluciojn faritajn dum la Landa Kongreso de NEL pentekoste.

Ni manĝis kolbasojn, trinkis kafon kaj kunportitajn buterpanojn, kaj finfine la plejparto de la ĉeestantoj iris al la kroketludejo, kie ili ludis kaj dancis ĝis estis tempo por reiri al la urbo.

Raportis *Harda Danielsen*.

S-ro Elemer Kelemen, Str. Florilor 9, SF. GHEORGHE, Jud. Covasna, Runaujo, ŝatus korespondi kun fraŭlinoj 17—21-jaroj. Estas 21-jara ekonomo. Intereso: fremdaj lingvoj, literaturo, sporto, turismo, vojaĝoj, bildkartoj, dia-pozitivaj.

*

S-ro Lembit Tangsoo, Riiska 4, 202532 TORVA, Estonio, USSR, serĉas sincerajn leteramik(in)ojn. Interŝanĝas bildkartojn.

F-ino Francisca Gil, Rua Martins de Oliveira 410, SOROCABA, S.P., Brazilo, komercantino, dez. korespondi.

*

S-ro Rudolf Majdcinsky, Krizikova 931, JIRKOV 1, okr. Chomutov, Ĉeĥoslovakio, teknikisto, intereso: bildkartoj, sporto, insignoj.

KUPONLETEROJ

La plej nova ideo de la redaktoro estas dissendo de t.n. kuponletero. Ĉiu letero havas konkurson kaj dek kuponojn. Kaj la premioŝancoj estas tre grandaj. Kelkaj el la ricevintoj ĝis nun ne reagis — kial? Aliaj, precipe en Bergen, rapide reagis.

*

Korespondu

Delonge mi deziras korespondi kun iu el via lando, knabo aŭ knabino. Mi estas 16-jara hungara lernantino. Kovács Emöke, Harkányföldö, Köröti Csana Sándor utca 10, Baranya megye, Hungarujo.

*

Mi estas 33-jaran instruistino de violono en muziklernejo, kiu ege deziras kontakti kun norvegaj gekorespondantoj. Mi interesiĝas pri diversaj aferoj, ne nur muziko. F-ino Jivka Dekova, str. Car Asen 9, Sofia C, Bulgarujo.

*

Eino Adrienne Földi, Vörösmarty utca 34, II. MISKOLC 1., Postán-marad, Hungarujo, 28-jara oficistino, serĉas korespondanton. Ŝatas legi, aŭskulti muzikon, viziti muzeojn kaj artgaleriojn. Literaturo, historio, arthistorio. Kolektas bildkartojn.

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo

Telefon: 69 14 39

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradrese: General Birchs gate 30, Oslo

Telefon: 69 14 39

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,

Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg.
Telefona: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykt hos A. Sæther A.s - 2300 Hamar